



## UvA-DARE (Digital Academic Repository)

### Ĉu Duolingo sufiĉas?

*Motivoj lerni Esperanton kaj spertoj de duolinganoj*

Gobbo, F.; Koelewijn, Iris Marijke

#### Publication date

2025

#### Document Version

Final published version

#### Published in

Esperanto

#### License

Article 25fa Dutch Copyright Act (<https://www.openaccess.nl/en/policies/open-access-in-dutch-copyright-law-taverne-amendment>)

[Link to publication](#)

#### Citation for published version (APA):

Gobbo, F., & Koelewijn, I. M. (2025). Ĉu Duolingo sufiĉas? Motivoj lerni Esperanton kaj spertoj de duolinganoj. *Esperanto*, 118(1398 (2)), 38-40. <https://uea.org/revuoj/sono/2025/2>

#### General rights

It is not permitted to download or to forward/distribute the text or part of it without the consent of the author(s) and/or copyright holder(s), other than for strictly personal, individual use, unless the work is under an open content license (like Creative Commons).

#### Disclaimer/Complaints regulations

If you believe that digital publication of certain material infringes any of your rights or (privacy) interests, please let the Library know, stating your reasons. In case of a legitimate complaint, the Library will make the material inaccessible and/or remove it from the website. Please Ask the Library: <https://uba.uva.nl/en/contact>, or a letter to: Library of the University of Amsterdam, Secretariat, P.O. Box 19185, 1000 GD Amsterdam, The Netherlands. You will be contacted as soon as possible.

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

# Esperanto

118-a jaro • n-ro 1398 (2) | februaro 2025

70 jaroj da kunlaboro inter Unesko kaj Esperanto pri lingvaj homaj rajtoj | 27

La 3-a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio | 30

La Inaŭgura ceremonio de Tutmonda Centro pri Informo kaj Kulturo de Esperanto | 33

Zamenhof-Tago en ĉiuj partoj de la mondo | 34



ISSN 0014-0635

# Ĉu Duolingo sufiĉas?

## Motivoj lerni Esperanton kaj spertoj de duolinganoj

Federico Gobbo kaj  
Iris Marijke Koelewijn,  
Universitato de Amsterdamo

### 1. Celoj kaj kunteksto de la esploro

Rande de la fino de junio 2024, kadre de la Universitato de Amsterdamo, Marijke Koelewijn finpretigis sian tezaŝeton pri socilingvistiko de la 'duolinganoj', kiel oni nomas neformale la lernantojn de Esperanto retumajn, kiuj utiligas la kurson Duolingo. Ĉi tiu artikolo intencas prezenti al la Esperantlingva publiko la ĉefajn rezultojn de la esploro skribforme<sup>1</sup>.

La Esperanto-kurso por anglalingvanoj aperis en Duolingo en 2015, kaj ekde sia apero kaj disvolviĝo vekis multe da atento kaj ene de la Esperanto-parolantaro kaj ekstere. Kiel notis Fians en sia antropologia esploro pri la nuntempa Esperanto-movado kun aparta atento al la situacio en Francio, unuflanke estis entuziasmo pri la videbligo de Esperanto tra unu el la plej uzataj lingvolernigaj apoj de la mondo, aliflanke estas zorgoj pri la maniero konvinki la duolinganojn eniĝi la Esperanto-komunumon ekster la reto, tio estas la reala mondo.

Sur tiu bazo formiĝas la esplordemandoj de la tezaŝeto: kiuj estas ĉi tiuj novaj lernantoj de Esperanto? Kio motivigas ilin eklerni Esperanton, kaj ĉu ili havas sperton pri la movado kaj la komunumo ekster la uzo de Duolingo? Krome, ĉu ĉi tiuj lernanoj opinias, ke Duolingo estas efika

metodo por lerni Esperanton? Laŭ la scio de la aŭtoroj, tiu ĉi estas la unua socilingvistika esploro pri tiu ĉi grava temo, kaj do ĝi havas ekkonigan karakteron. Tio signifas, ke ĉiuj rezultoj prezentotaj ĉi-sube bezonas konfirmon aŭ reellaboradon per pluaj farendaj esploroj; alivorte, ili valoras kiel startpunkto.

La esploristo intervjuis perrete 12 homojn kiuj uzis aŭ uzas Duolingo-kurson por lerni Esperanton. Partopreno estis laŭvola; la volontuloj sin proponis post apero de duolingva angla-Esperanta afiŝo en specifa fejsbuka grupo, kiu estas tre populara<sup>2</sup> inter la anglalingvaj lernantoj de Esperanto tra Duolingo. Fakte, ĝi estis lanĉita jam en 2015, ĝuste post la apero de la kurso. Novbakitoj starigas demandojn kaj spertaj esperantistoj pacience respondas; la lingvoj de la grupo estas la angla (kiu aperas pli ofte) kaj Esperanto.

Figuro 1: dulingva anonco pri la esploro en la grupo



Tabelo 1: ĝeneralaj informoj pri la partoprenantoj al la esploro

	loĝlando	aĝogrupa	profesio	lingvo de la intervjuoj
1	Meksiko	juna (20-39)	instruisto en altlernejo	Esperanto
2	Usono	meza (50-59)	nekonata	la angla
3	Usono	juna (20-39)	nekonata (diplomo en muziko)	la angla
4	Usono	meza-emerita (50-69)	advokato	la angla
5	Francio	juna (20-39)	nekonata	Esperanto
6	Luksemburgo	meza (40-59)	dungito en la Eŭropa Parlamento	la angla
7	Francio	emerita (60-69)	pensiulo	la angla
8	Usono	juna (20-39)	muzikisto	Esperanto
9	Belgio	juna (20-39)	universitata studento	la angla
10	Pollando	meza (40-59)	universitata esploristo kaj docento	la angla
11	Germanio	meza (40-59)	filologo, dungito ĉe la Ministerio por Eksterlandaj Aferoj	la angla
12	Italio	meza-emerita (50-69)	entreprenestro en multnacia korporacio	Esperanto

<sup>1</sup> La tezaŝeto (en la angla ĵargono de la Universitato de Amsterdamo: tutorial) estis verkita en la angla kaj longas pli-malpli 7 730 vortojn entute. Ĝia referanto estis Federico Gobbo. Normale tiaj akademias produktoj ne obtenas ajnan publikigon post la pritakso, sed ĉi-foje la temo, metodo, perlaborado kaj rezultoj de la esploro, malgraŭ ĝia mallongeco, valoras la penon altiri la atenton de la legantoj. La rezultoj de la tezaŝeto estis prezentitaj en Esperanto de Iris Marijke Koelewijn kadre de la kurso de Esperanto en la Universitato de Amsterdamo antaŭ ĝia finverkado. Ŝi ankaŭ prezentis la projekton ĉe la Internacia Junulara Kongreso 2024.

<sup>2</sup> En junio 2024 aliĝis al ĝi pli-malpli 15 000 homoj, kio estas rimarkinda nombro.

**Tabelo 2:** informoj pri la lingva repertuaro de la partoprenantoj al la esploro

	Gepatra lingvo	Fluparolataj lingvoj	Iel scipovataj lingvoj
1	la hispana	la angla, itala, portugala kaj Esperanto	
2	la angla		la indoneza, Latino kaj Esperanto
3	la angla		la germana, hispana kaj Esperanto
4	la angla		la hispana, rusa, Latino kaj Esperanto
5	la franca		la angla, rusa kaj Esperanto
6	la hispana	la angla, itala, franca, germana	la hungara, rusa kaj Esperanto
7	la franca	la angla	la nederlanda, germana, Latino kaj Esperanto
8	la angla	Esperanto	la nederlanda, hispana
9	la ĉefa ĉina	la angla, franca	la kantona ĉina, nederlanda, germana kaj Esperanto
10	la pola, rusa	la angla, ĉefa ĉina	la hispana, la klingona, Latino, Esperanto kaj aliaj
11	la germana	la angla, estona, finna (eble aliaj baltaj aŭ skandinavaj)	la franca, klasika greka, Latino (ne mencias Esperanton!)
12	la itala	la angla, franca, germana, hispana, kataluna	la portugala, nederlanda, finna, rusa kaj Esperanto (ĉi-lasta nur kiel komencanto, laŭ mempritaksado, sed laŭ la intervjuinto li parolis ĝin sufiĉe flue)

Interesatoj estis petitaj tra la surmenciita afiŝo sendi retmesaĝon al la esploristo por aranĝi perretan intervjuon, kiu estis surbendigita. Intervjuoj daŭris ĉirkaŭ po 30 minutojn; ĉiu intervjuo estis poste transskribita por plua analizo<sup>3</sup>. La unua demando de la intervjuo estis ĉiam la sama: 'Kial vi unue decidis lerni Esperanton? Kiam?' Bonvolu noti, ke la intervjuitoj povis elekti la lingvon de la intervjuo inter la angla kaj Esperanto.

**Tabelo 1** prezentas la ĝeneralajn informojn pri la partoprenantoj, post oportuna anonimigo; datumoj estis donitaj laŭvole, sen specife demandi pri ili kaj pro tio ofte ili estas nekompletaj<sup>4</sup>. Oni povas ankaŭ konstati, ke ne ĉiuj lernantoj de Esperanto per Duolingo estas junuloj, male al la kutima sinteno ene de la esperantistaro. Krome, notindas, ke kvar homoj elektis Esperanton kiel la lingvon de la intervjuo, do unu triono de la intervjuitoj. La formala eduko-nivelo de la intervjuitoj, la sufiĉe alta nivelo de multlingveco kaj fine la pozitiva sinteno al la lernado de lingvoj estas tipaj sociologiaj trajtoj de la Esperanto-parolantoj<sup>5</sup>.

La intervjuoj estis duonstrukturitaj; tio signifas, ke, post la unua, la sekvaj demandoj povas veni ajnaorde, depende de la respondoj donitaj al la esploristo kiu decidas kiel stiri la intervjuon mem. Ekzemple, la esploristo iam enketis ĉu la lernanto uzas aliajn metodojn aŭ materialojn

flanke de Duolingo por lerni Esperanton; tio celas respondi la esplordemandon ĉu Duolingo sufiĉas (aŭ ne) por lerni Esperanton. Alia pritema, nereakta, demando estas ĉu la motivoj lerni Esperanton ŝanĝiĝis ekde la komenco de la lernado ĝis la nuna momento.

**Tabelo 2** prezentas la lingvan repertuaron de la partoprenantoj, laŭ la ordo de ili elektita. Bonvolu noti, ke la informoj estas nekompletaj, ĉar ne estis specifa demando cele al la listigo de ĉiuj lingvoj iel konataj de la intervjuito. Tamen notindas, ke la temo emerĝiĝis spontanee en ĉiuj intervjuoj, senescepte, tute kompreneble, kiam alvenis la peto kompari kialojn inter la lernado de Esperanto kaj de aliaj lingvoj<sup>6</sup>.

Krom Duolingo, la alia sufiĉe populara instrumento por lerni Esperanton tra la reto estas la retejo *Lernu.net*. Ĝin same uzas kvar intervjuitoj, do unu triono. Interese, pli ol duono de la intervjuitoj flanke al Duolingo uzas librojn por lerni la lingvon, dum estis nur unu kiu sekvis realmondan kurson.



3. La transskribo montris, ke kaj la uzo de la angla kaj de Esperanto estis kelkfoje gramatike erara; la lingvouzo ne estis la celo de la esploro, do la transskribado indikis interkrampe la eventualajn erarojn sed ne analizis ĝin ene de la tezaĵeto mem.

4. Kompreneble, nek geografie, nek aĝe, la partoprenantaro havas statistikan signifon. Rimarkinde, estis nur unu virino inter la partoprenantoj.

5. Tiuj ĉi sociologiaj trajtoj estas stabilaj tra la historio de la Esperanto-movado. La faklibro de Garvía, Roberto (2015) *Esperanto and Its Rivals: The Struggle for an International Language*, Penn Press, raportas pri la unua esploro pritema en la 1920-aj. Krome, la freŝdataj esplorrezultoj de Guilherme Fians inter la jaroj 2020 kaj 2022 pri Francio kaj la esploro pri Italio fare de Irene Caligaris konfirmas ilin en la nuntempa Esperanto-parolantaro. Fontoj: Caligaris, Irene. 2021. *Unu lingvo por ĉiuj, unu lingvo de neniu lando: Surkampa esplorado pri la esperantaj identecoj*. Pisa: Edistudio. Fians, Guilherme. 2020. *Mind the age gap: Communication technologies and intergenerational language transmission among Esperanto speakers in France*. *Language Problems and Language Planning* 44(1), pp 97-108. DOI 10.1075/lplp.00057.fia. Fians, Guilherme. 2022. *Esperanto revolutionaries and geeks: language politics, digital media and the making of an international community*. Cham: Palgrave Macmillan. DOI 10.1007/978-3-030-84230-7

6. Tiu ĉi rezulto ne estas tute surpriza, pro la fakto, ke la lastatempa lingva ideologio de Esperanto eksplicite subtenas multlingvismon. Vidu la anglalingvan fakartikolon: Gobbo, Federico, (2017). *Beyond the Nation-State? The Ideology of the Esperanto Movement between Neutralism and Multilingualism*. *Social Inclusion* 5(4), pp 38-47. DOI 10.17645/si.v5i4.1140

## 2. Ĉefaj motivoj lerni Esperanton

Post la transskribo, la intervjuoj estis kvalite analizitaj por respondi la esplordemandojn kaj eventuale trovi aliajn interesajn temojn. La unua pridemandata temo estas la motivoj lerni Esperanton, kiuj esence rezultis esti trispecaj: la unua temo estas ĝenerala intereso lerni novajn lingvojn; la dua koncernas la fakton, ke Esperanto estas lingvo kun idealo – t.e. esti justa por internacia komunikado; trie, oni iel mencias la tiel-nomatan facilecon lerni Esperanton<sup>7</sup>. Pri la unua temo, ofte la intervjuito jam estis lernanta alian lingvon per Duolingo, kaj malkovris, ke Esperanto estas (aŭ estis) sufiĉe populara inter la Duolingo-uzantoj kaj do decidis eklerni. Interese, la dua motivo, t.e. la lingva idealo, pli gravas post la eklerna fazo: kelkaj intervjuitoj mencias la surprizon malkovri en la reto la ekziston de Esperanta kulturo, kiel ekzemple originalaj muzikaĵoj, podkasto aŭ jutubistoj. Krome, notindas specife kelkaj eksplicitaj mencioj pri Zamenhof kaj liaj ideoj. La tria motivo, t.e., la facileco de Esperanto, estas pli komplika. Ĝenerale homoj kiuj menciis tion, trovas la lingvon tre simila al unu aŭ pli da lingvoj de la repertuaro, aŭ vortprovize (ekz. la franca) aŭ strukture (ekz. la hungara). Sed, sufiĉe interese, aliaj kredis je facileco unuavide, sed poste ŝanĝis la ideon, ĉar ju pli ili profundiĝas en la lernadon, des pli la lingvo aperas *mal*facila, kaj ili preskaŭ trovas la sloganon ‘Esperanto facila lingvo’ trompo. Alia sufiĉe populara motivo estas la abundo de libera tempo, pro la kovima tutmonda pandemio, periodo en hospitalo aŭ pensiigo. En ĉi tiuj okazoj, la elekto lerni Esperanton venas el la deziro havi cerban gimnastikon aŭ intelektan defion.

Estas aliaj du malpli oftaj tamen menciindaj motivoj: la unua estas renkonti novajn homojn, kontrastigante Esperanton kiel ‘lingvon de l’ amikeco’ disde la angla kiel *business language*; la dua estas rekonekti sin kun mankanta lernado en frua periodo de la vivo. Pri ĉi-lasta, tipe homoj renkontis hazarde Esperanton dum junaĝo – ekzemple tra la lernejo – sed neniam alfrontis la lernadon, kaj pro tio, kvazaŭ por plenigi vivtruon, ili decidis ellerni ĝin plenkreskule, kiam ili havas pli da regado sur la tempo de sia vivo. Paralele oni mencias, ke la praktika valoro de Esperanto ne gravas, ĉar la lingvo en si mem vekas intereson kaj scivolemon.

Flanka rezulto de la demandoj pri la lingva repertuaro de la intervjuito estis, foje eĉ spontanee, pritakso de la tiel nomata ‘propedeŭtika valoro de Esperanto’, tio estas la supozata fakto, ke Esperanto faciligas lerni aliajn lingvojn. Sufiĉe surprize, la ĝenerala sinteno estas, ke tiu ĉi valoro aŭ dubindas, aŭ sin pruvis malforta por esti valida motivo ellerni Esperanton, eĉ inter homoj kiuj konsideras Esperanton facila lingvo. La ideo-ŝanĝigo alvenas paralele al la ekkono de la Esperanto-kulturo, kies intereso anstataŭas la ‘facileco-faktoron’ tra la lernado-procezo. Alia eble surpriza rezulto estas preskaŭ manko de mencio pri Pasporta Ser-



vo kaj ĝenerale la ŝanco vojaĝi tramonde per Esperanto; tio kongruas kun la efektiva manko de verdaj spertoj eksterrete, realmonde. Tre interese, neniu ŝajnas kredi je ĝenerala adopto de Esperanto kiel ĉies dua lingvo (la esprimo ‘Fina Venko’ neniam aperis); signifoplene, tiurilate unu partoprenanto deklaris angle (nia esperantigo): ‘lingvo estas tre efika politika ilo, eĉ armilo; kaj en la moderna epoko poviplenaj homoj ne facile forlasas armilojn’.

## 3. Ĉu nur retuma lingvo?

Neantaŭvideble, la intervjuanto konstatis, ke laŭ kelkaj el la intervjuitoj temas pri la tute unua konversacio en Esperanto, kiun ili ĉiam ajn havis en sia vivo – ne sen emocio! Fronte al rekta demando pri la partopreno al renkontiĝoj en lokaj kluboj, la respondoj estas preskaŭ la samaj – neniam aŭ unufoje. Ekzemple, devigo moviĝi al apuda urbo vespere igas la aferon malalloga, kaj la percepto pri tio kion signifas ‘apuda’, ŝanĝiĝas multe inter eŭropanoj kaj usonanoj, ekzemple. Alia kialo ne partopreni lokan renkontiĝon estas senti sin nekonfidaj pri sia lingvonivelo, aparte pri gramatika precizeco. Notindas, ke la intervjuanto neniam lingve korektis la intervjuitojn, ĝuste cele sentigi ilin komfortaj paroli libere dum la intervjuo mem. Ekzemple, la intervjuanto mem uzis anglan vorton kiam estis risko de nekomprenejo, rompante tabuon pri kodoŝanĝo aŭ lingvomiksado, kiu ŝajnas ekzisti en Esperantujo, simbole esprimita per la idiomaĵo ‘ne krokodilu’<sup>8</sup>. Do, responde al la ĉefa esplordemando, la granda plejmulto de la lernantoj firme asertis, ke Duolingo estas (tre) alloga por komenci la lernadon sed absolute ne sufiĉa, ĉar ĝi neniel klarigas eksplicite la gramatikon kaj ĉar la lernanto neniam parolas Esperanton, nur skribas kaj aŭskultas. Tiu ĉi respondo al la koncerna esplordemando formulita dekomence aperas tre klara.

Se oni komparas la ĝeneralajn rezultojn de ĉi tiu malgranda esploro kun la fakliteraturo, ili ne konfirmas la eltiroj de la kamplabora esploro de Fians, ekzemple. Pri tio, aparte notindas, ke ne estas signifaj diferencoj en la respondoj laŭ la aĝogrupoj, nek la ludema aliro de Duolingo estas decida faktoro por ekparoli la lernantojn, retume aŭ realmonde. Certe la kerna demando, kiamaniere konvinki la retumajn lernantojn eniri la Esperanto-komunumon, restas senresponda sed nepre grava, almenaŭ en la kunteksto de Duolingo.

7. Po sep homoj menciis la tri motivojn, ne necese la samaj homoj.

8. Interesatoj pri la temo bonvolu legi ĉapitron 22 de la sekva anglalingva faklibro pri Esperanto: Sabine Fiedler kaj Cyril Robert Brosch, 2022, *Esperanto – Lingua Franca and Language Community*, John Benjamins.